

C-4

ESPERANTAJ


KANTOJ




ELDONITA DE
PROPAGANDA FAKO

1915

“Ni laboru, sed kantante!”





Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Alcalá de Guzmán San Pedro 13 - 3^o - 7, E-29015 MADRID
Tel. +34 - (0)1 - 4468079

ESTA Sociedad esperantista, fundada en Enero de 1907 única y exclusivamente para la propagación del Esperanto, como lo acreditan los varios cursos dados en la misma, cuenta con una nutrida biblioteca esperantista compuesta de las obras más celebradas de renombrados autores. Además, diariamente, se dan cursos gratuitos, para ambos sexos, bajo el horario siguiente:

Primer curso

De 9 á 10 noche. (Lunes, miércoles y viernes)

Segundo curso

De 8-30 á 9-30 noche. (Martes, jueves y sábados)

Curso práctico

De 9-30 á 10-30 noche. (Martes, jueves y sábados)

—:—

Asturias, 1. — Barcelona

Es el *Esperanto* una lengua auxiliar internacional practicada por un número cada día más creciente de individuos de todos los países civilizados. Gracias a ella, los hombres de todas las naciones pueden fácilmente comprenderse. El pequeño esfuerzo intelectual que representa la adquisición del idioma *Esperanto*, se vé pagado con creces por la satisfacción de colocarse al nivel de *hombres por quienes nada humano les es extranjero*.

Aprendiendo, practicando y propagando el hermoso idioma internacional

Esperanto

se contribuye al progreso humano, misión a que viene destinado el hombre sobre la tierra.

Biblioteca **PACO KAJ AMO**

LA ĈIAMA KANTAJO

(LA CANÇÓ DE SEMPKE)

POR

SANTIAGO RUSIÑOL

TRADUCCIÓN DE


ALFONSO SABADELL

—:—

Precio : 0'25 Ptas.



JMP. E. BADIA - STO. DOMINGO, 8. - BARCELONA



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

LA ESPERO

Re: Triguoz San Pedro 13 - 39 - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. ZAMENHOF.

LA VOJO

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoĵ de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas la voj' elektita.

Nur rekte kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas —
Ni semas kaj semas konstante.
«Ho, ĉesu!» mokante la homoj admonas, —
«Ne ĉesu, ne ĉesu!» en kor' al ni sonas:
«Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi paciencie eltenos».

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj,
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.

EL CAMÍ

Tras densa foscuria llueix ja la meta
Que ardots perseguim;
En nit tenebrosa, estrella fulgenta
Que 'ns signa 'l camí.
Ja no 'ns intimiden fantasmes nocturnes,
Adversa fortuna ni estúpides burles,
Puig clara, ben dreta i ben definida
Se 'ns mostra la vía escollida.

De dret i amb coratje, sens mai desviar-nos
Seguim nostra vía!
Fins d'aigua la gota, forada, amb constancia,
La roca granítica,
Perfidia, esperança i llarga paciència,
Aitals són els medis per quina potencia
Poquet a poquet, i tras lluita penosa,
Podrem assolir-la, la fita gloriosa.

Sembrem incansables, en hores vinentes
La pensa fixada:
Encara que 's perdin llavors a dotzenes,
Seguim nostra tasca.
«Pareu ja!» la turba nos crida barlona, —
I, al punt, veu potentia dins nostre ressona:
«Avant, avant sempre! Lluitant amb fermesa,
veureu benefida pels nêts vostra empresa».

Si llarga sequia, o bé 'l torb, arrenca
Les fulles marcides,
Lloem la tempesta que 'ns don fresca saba
I espurga les files.

Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco, —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

L. ZAMENHOF.

La gaja migranto

Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom',
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon, al la hom'.

De l' montoj riveretoj fluas,
Alaŭdoj kantas super mi,
Mi ankaŭ gajan kanton bruas
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo:
Li zorgas pri la tuta ter',
Li ankaŭ min sur mia vojo
Eterne gardos de danĝer'.

L. ZAMENHOF

Es brau nostre exèrcit! Ja res el detura;
Ni 'l vent ni la calma li donen paüra.
Valenta es sa marxa, provada, atrevida;
Seguint, avant sempre, la vía escollida.

De dret i amb coratje, sens mai desviar-nos
Seguim nostra vía!
Fins d'aigua la gota, forada, amb constància,
La roca granítica.
Perfidia, esperança i llarga paciència,
Aitals són els signes per quina potència
Poquet a poquet i tras lluita penosa,
Podrem assolir-la, la meta gloriosa.

Trad. JAUME MUIXÍ, Pbre.

La Kapelo

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto,
Goje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonis tra l' silento, —
Haltis knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos.

L. UHLAND (*Trad.* L. ZAMENHOF.)

FRATA MARŜO

Kamaradoj, fratoj en laboro,
Sankta flamo nin de nun varmigu,
En ni estu ĉiam unu koro,
Sama celo forte nin kunigu.

Fine ĉesis lingva diverseco,
Nun komprenas frato sian fraton,
Nun fariĝas vera unueco,
Nek malhelpos io la revaton.

Jen rigardu: tie estas Ruso,
Tiu venas el Katalunujo,
Tie Anglo, Turko, tie Pruso,
Ne disputas ili pri patrujo.

Samalingve, ĉiuj ni forgesas,
Ke ni estas el malsama lando.
Ridu, moku, tamen ni promesas,
Ke ne haltos nia propagando.

Rekantaĵo

La homaro estas familio,
De malpaco ni vualon ŝiru,
Jam proksime brilas sunradio,
Al estonto ni antaŭen iru.

G. KOLOVRAT.

LA INTERNACIO

I

Ni staru! damnitroj de l' tero!
Ni staru! malsategular'!
Racio tondras en kratero;
Finiĝas riĉegular'!
Ni estinton malaperigu!
Bazon ŝanĝos tuj la mond'!
Sklavaro! Tuj ni nin starigu!
Estu ĉio sur tera rond'!

II

Ne estas supera savonto,
Nek Dio, nek ia regant'.
Laborantoj ni estu sorto;
Estu ni la bonagant'!
Savu ni la tutan homaron;
Al ĝi reiru la ter'!
Ni blovu mem sur forĝilaron;
De ni forĝiĝos varma fer'!

III

La ŝtat' premegas laboranton;
Impost' kune kun la leĝar'
Favoras nur la posedanton
Malbenestu la reĝar'!
Tuj finiĝu ĉe ni la ploroj!
Egalec', jen vera leĝ'!
La pacon ne donas doloroj,
Nek la feliĉon donas reĝ'!

IV

Malbelaj en apoteozo,
Cu reĝoj de minej', ferar'
Iam ajn ne estis la kaŭzo
Pri ŝtel' de l' laborantar' ?
En monkestoj de tia bando
Amasiĝis multa mon'.
Eltiru ni ĝin por la lando!
Ni postulu pri la redon'!

V

Farmistoj laboristoj estas
La granda Labora Parti',
Nur homoj la teron posedas!
Fiburĝar', for iru vi!
Se la korvoj tuj malaperos
Kaj vulturoj je l' aŭtun'
En la ĉiel' ankoraŭ regos
La nia bonfaranta sun'.

VI

La reĝoj nin satigis fume.
For tiranoj! Pac' tie ĉi!
Armeon strik' eniru! Dume,
La armilojn rompu ni!
Se obstinas la kanibaloj
Por nin heroigi jam:
Vi, niaj karaj generaloj,
Ricevos la kuglojn iam!

Rekantaĵo (dufoje)

Jen la bataladfino!
Forton kunigu ni!
La Internacio.
Sur la mond' regu ĝi!

Trad. F. BLANGARIN.